Universala Esperanto-Asocio

# GRATULO al ILEI

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-17 sendita el Busano, Koreio, la 17an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Saluto de UEA al la jubilea kongreso de ILEI

50a Kongreso de ILEI en Busano, Koreio, de la 15a ĝis la 22a de julio, 2017

"Antaŭ du jaroj, Universala Esperanto-Asocio – UEA – okazigis sian centan Universalan Kongreson; nun nia instruista ligo atingas simile gravan jubileon, per okazigo de la 50a Kongreso de ILEI.

Nome de UEA, kies vicprezidanto mi estas, mi etendas al nia instruistaro gratulon pro la atingo de tiu rimarkinda mejloŝtono. Des pli konvene por jubilea kongreso, ĝi atingis imponan sumon de 208 aliĝintoj, la plej altan en multaj jaroj, kaj verŝajne iam ajn. Antaŭ nur kvino da jaroj, la ligo ĝojis pro cent aliĝintoj, tra tiuj lastaj jaroj la kreskanta renomo de la konferencoj – nun rebaptitaj kongresoj – garantiis konstantan kreskadon. Kune kun la gratulo, mi deziras al la kongreso grandan sukceson, kaj fake kaj turisme.




ILEI ludas aparte gravan rolon en la konstelacio de nia movado. UEA rekonas kvar kolonojn kiuj subtenas la UEA-domon: ili estas Konsciigo, Kapabligo, Komunumno kaj Kunordigo. Unike, ĉe Kapabligo, ILEI transprenas gravan parton de la taskaro: do ĝi forte kontribuas al instruista trejnado, pri la registro kaj subteno de kursoj, pri eldonado de edukrilataj verkoj kaj okazigo de ekzamenoj. Ni havas plurajn atestojn pri la proksima kaj intensiĝanta kunlaboro inter UEA kaj ILEI. La kongresaj temoj de Busano kaj tiu de la UK tre similas. Ĉe UEA, la temo estos: "Turismo kaj Evoluo: Vojoj al

daŭripovo”. ILEI logike decidis emfazi la rolon de instruistoj lige al tiu temaro: “Edukado al Respektoplena Turismo”, ĉar sen edukado pri la temo la homoj malmulte progresos per pli pozitiva sinteno.  Nuntempe la emo kaj ebloj por amasa vojaĝado kreskas, sed kiucele turistoj vizitas? Kiugrade ili vere konatiĝas kun la kulturo kaj kutimoj de la vizitataj landoj? Esperantistaj turistoj (vidu la foton!) havas grandajn eblojn respondi jese.



Plie, necesas demandi, kiugrade la nuna turismo utilas aŭ malutilas al la bonfarto de homoj en evoluantaj landoj, kaj kiom daŭripova estas tiu nuntempa turismo?

Mi volas elstarigi du pliajn kampojn en kiuj UEA kaj ILEI kunlaboras. Kadre de la nuna Kongreso okazos seminario de UEA pri Aktivula Maturigo, pli mallonge, AMO. Tiu nova programo de UEA estis lanĉita en marto de 2014, kaj nun, post nur iom pli ol tri jaroj, ni jam atingas la 38an AMO-seminarion. Rimarkinda sukceso.

En la UK en Nitra antaŭ unu jaro UEA kaj ILEI kune inaŭguris la Jaron de la Lernanto. Tra la sekva 12-monata periodo okazis tra kvar kontinentoj 19 eventoj pri tiu Jaro.

Ripetante la gratulon kaj saluton de UEA, ni fidu, ke tiu kunlaboro kun ILEI kresku kaj prosperu.”

============== fotoj kaj saluto: smg ==============










Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.